FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 2 | Aprilo/junio 2010



La Verda Domo (vidu paĝo 4)

Nekutima invito

Por veni 13-an de Marto en la Esperanto-urbon *Herzberg*, la GEFA-prezidanto estis invitita de Germana Fervojo *DB* kaj de la urboj *Herzberg* kaj *Osterode*. Eksterordinara okazo tie estis bapto de la kombinitaj motorvagonoj 648 253 / 648 753 je la nomo *„Herzberg am Harz"* kaj 648 255 / 648 755 je la nomo *„Osterode am Harz"*. Ambaŭ dizelaj vagonkombinaĵoj apartenas al la *DB*-filia kompanio *Harz-Weser-Bahn* (Harco-Vezero-Fervojo). Kvankam *Osterode* estas iomete pli granda ol *Herzberg*, ĝi havas nur du simplajn haltejojn. Pro tio la bapto okazis komune en vera stacio, do en *Herzberg*.

Por tiutage plenumi alian gravan funkcion, *Achim Meinel* petis min anstataŭi lin en la Esperanto-urbo. Sur la kajo 1 du viglaj blovorkestroj komune inaŭguris la spektaklon. Baldaŭ alvenis laŭordona trajno sen pasaĝeroj el iu alia urbo. La novaj nomoj super vagonfenestroj jam estis legeblaj. Oni rezignis provizore kaŝi ilin. Cetere, pri peto de ICH-esperantistoj, survagone aldoni *„die Esperanto-Stadt* / la Esperanto-urbo", la kompanio – kompreneble – neis. En trajntrafika paŭzo oni veturigis la vagonaron al kajo 1, kie intertempe amasiĝis spektantoj. Inter ili mi ekvidis *Zsófia Kóródy* kaj *Peter Zilvar* de Interkultura Centro *Herzberg* (ICH). Ni restis komune ĝisfine.

La bapto konsistis el festparoladoj de *DB*-responsulo, de ambaŭ urbestroj kaj el ŝprucigo de ŝaŭmvino al po unu vagonkesto. Feliĉe la boteloj restis sendifektaj. En siaj paroladoj, *Gerhard Walter* (*Herzberg*) kaj *Klaus Becker* (*Osterode*) menciis kreskantan uzadon de tieaj trajnoj, esperis eternan daŭrigon de fervojtrafiko en la regiono kaj ĝojis pri sia sukceso instali privatajn biletvendejojn en ambaŭ urbocentroj. *DB* ja fermis siajn stacidomajn giĉetojn. Surkaja regalado per sandviĉetoj, kafo kaj varmega ruĝa vino, kaj nelaste ekspozicio de ĉefe fervojaj miniaturoj en la stacidomo plenigis la gajan aranĝon.

Heinz Hoffmann



Urbestro Gerhard Walter (dekstre) kaj Heinz Hoffmann (maldekstre)



In memoriam Joachim Gießner

2003 verstarb Joachim Gießner. Er war 1956 bis 2002 unser Präsident. Seine Verdienste als Esperanto-Pionier sind auf der Lore aufgelistet, die als Denkmal in Würdigung seiner Verdienste am 30. Juni 2007 am Bahnhof Herzberg eingeweiht wurde. Den Bericht hierzu kann man in FE 3/2007 nachlesen.

Ferii en Usono, en la „Verda Domo“

Nun mi deziras rakonti pri niaj belegaj tagoj dum januaro 2010 en „Verda Domo“ en *Tempe*, ĉe *Phoenix*.

Kiel ni trovis la „Verdan domon“ kaj kial ni feriis tie? Eble vi scias, ke mia plej aĝa filo vivas kaj laboras en Usono, en *Chicago*. Li jam kelkajn jarojn laboras tie en la flughaveno de *Chicago*, ĉe la flugkompanio *Delta*. Ĉiujare li invitas min viziti lin por ses semajnoj. Pro diversaj kaŭzoj tio eblas bedaŭrinde nur dum vintro, dum la kristnask- kaj jarŝanĝaj tagoj. Por sia patrino li ricevas unufoje jare senpagan flugbileton de la flugkompanio. Nur imposton li mem devas pagi. Do, por ses semajnoj mi sole forlasis mian ŝatatan edzon, ĉar por ni ambaŭ mankas loko en la loĝejo tie. Mi ne estas certa, ĉu mia ŝatata edzo ĝojas aŭ bedaŭras tiun sessemajnan geedzan paŭzon. Certe la bedaŭro superas iom la ĝojon. Nun mia edzo kaj mi ne povis festi kune kristnaskon kaj jarŝanĝon. Ni pripensis, kiel mallongigi aŭ paŭzi nian solecon. Mia filo eksciis, ke li ankaŭ ricevus flugbileton por sia patrino, sed validan nur en Usono. Li rekomendis al ni, eble serĉi Esperantoparolanton ie en Usono, kie ni povu komune ferii je modesta prezo. Mi ĉiam deziris viziti *New York*-on. Sed tio estis nun, en la vintro, ne bona ideo, ĉar certe neĝas kaj frostas tie. Trafoliumante UEA-jarlibron, mia edzo trovis Esperantoparolantojn sufiĉe sude en varma regiono de Usono, nome en *Phoenix*, en *Arizona*, kie certe ne frostas kaj neĝas. La nomo de la trovita loko estis la „Verda Domo“ en *Tempe*, urbeto apud *Phoenix*. Mia edzo kontaktis rapide, (eble li urĝe bezonis paŭzon de siaj tagaj hejmtaskoj), la ĉarmantan posedantinon por fiksi deziritan daton por komune ferii.

La Verda Domo

La „Verda Domo“ troviĝas en granda, bela kaj bone flegita parko. La Verda Domo estis propradire ne vere verda, se oni preterrigardas la verdajn plantojn kaj arbojn, kiuj ĉirkaŭas la domon kaj eĉ floras dum la vintro. Eĉ la loĝĉambro kaj la kuirejo estas plenaj de verdaj plantoj kaj multkoloraj floroj. Sed la eksteraj muroj de la domo estas pentritaj per diversaj koloroj. Ĉu inter ili ankaŭ verdaj, mi ne plu memoras. Sed tiu kolibro, kiu ĉiutage vizitis arbuston antaŭ nia fenestro, portis verdajn plumojn inter sia plumvestaĵo. Verdaj ankaŭ estis la bone flegitaj razenoj, la palmoj kaj la multnombraj, altaj kaj malaltaj kaktoj ĉirkaŭ la domo. Sed la domo laŭ mia memoro ne.

La suno brilis la tutan tagon kaj la temperaturo atingis tagmeze preskaŭ 30° C. Ne miraklo. La malgranda urbo *Tempe* apud *Phoenix* en *Arizona,* kie situas la Verda Domo, troviĝas en la sudo de Usono, ĉe la meksika limo. La Verda Domo estas domo inter ĉirkaŭ 450 aliaj el ligno lukse konstruitaj. Ili aspektas kiel tiuj domoj, kiuj en filmoj kutime forflugas pro uragano (*Orkan)*. La tutan vilaĝon ĉirkaŭas alta muro kun de gardisto gardita enireja strato. Mia edzo diris, ke ĝi aspektas kiel geto por riĉaj homoj. Vidalvide de la „Verda Domo“ etendiĝis tre verda razeno je kies fino troviĝis la centro de la vilaĝo. La centro konsistas el naĝbaseno, librejo kun multaj libroj, granda salono kun scenejo, kie ĉiuj ankaŭ povas kuiri senkostan kafon, el saŭno, klubĉambroj, baseno kun kirliganta akvo kaj ĉambrego, ekipita de diversaj

muskolonj fortigantaj maŝinoj. Tiu pura kaj flegita centro estas vizitebla la tutan tagon kaj la duonan nokton, senkoste kompreneble. (Nia restado en la „Verda Domo" estas kompreneble ne tute senkosta.)

La sekreto de la verdeco de la „Verda Domo" estas la simbole verda koloro de Esperanto. Anĝelina, la ĉarma posedantino de tiu domo estas pasia Esperantistino el Irano, kiu jam multajn jarojn vivas en Usono. Spite de tio ŝi ankoraŭ ne perdis sian iranan moron kaj vivmanieron. Ŝi instruis en la universitato *Phoenix* iranan lingvon kaj Esperanton. Kelkfoje ŝi konigis kaj kuiris por ni iranan manĝaĵon. La ekipaĵo de loĝĉambo aspektas iom laŭ proksima oriento, same kiel la vestaĵo, kiun tiu ĉarma kaj beleta Anĝelina kutime portas. Dum la maten- kaj vespermanĝotempo, kiujn ni kutime mem preparis, ni tri multe babilis pri Dio kaj la mondo.

En iu tago ŝi petis konatulon veturigi nin, kontraŭ kelkaj dolaroj, tra la ĉirkaŭaĵo de Tempe por ekkoni i.a. la tipan arizonan pejzaĝon kaj vidindaĵojn. Granda diferenco: Antaŭ kelkaj tagoj ni venis el severa vintro kun multe da neĝo kaj nun ni promenadis kaj veturis en someraj vestaĵoj sub varma sunbrilo tra duondezerto kun multaj ŝtonoj kaj kaktoj. La dometoj, ambaŭflanke de la stratoj, havis ĉirkaŭ si sufiĉe vastan lokon. Ĉio ne estas tiom malvasta kiel en Germanio. Ni tuj rimarkis la diferencon inter Germanio kaj Usono. En Germanio ĉio estas iom malvaste konstruita kaj tie ĉi tia vasteco. Sed pri belec-komparo inter ambaŭ, devas ĉiu por si mem decidi. Ni paŭzis apud lago, artefarita en tiu akvomalriĉa regiono. En ĝi troviĝis la plej alten ŝpruciĝanta ŝprucfontano de la lando. Ĝi funkcias nur du horojn tage, sed ni ĵus venis kiam ĝi funkciis kaj ni povis rigardi tiun spektaklon. Ni vidis kaj eniris la plej belan, luksan kaj multekostan hotelon en Arizono. Fakte estas palaco, en kiu eĉ la koridoroj aspektas tiel. Ni estis scivolemaj kaj tial ankaŭ vizitis necesejon. Ĉiu uzinto ricevis freŝan mantukon el ŝtofo por sekigi la manojn. Unu tranokto (ne en la necesejo) kostas nur kelkaj miloj da Dolaroj. Ĉu ĝi ankaŭ konvenas por ni Esperantoparolantoj? Apud la hotelo troviĝis la plej granda kakto-ĝardeno de la lando kun la plej multaj diversaj specoj. Survoje ni eniris restoracion kaj manĝis tipe usonan manĝaĵon: „Sandviĉon". Ekzistis sandviĉoj en multaj diversaj variantoj. Sed sandviĉo restas sandviĉo, iom nekutima por niaj eŭropanaj palatoj. Ni dubas, ĉu ankaŭ ekzistas alia tipe usona manĝaĵo.

Eble ni eĉ estiĝis kunfondintoj de nova Esperantoklubo en *Phoenix*. Okazis jeno: Anĝelina kunvokis ĉiujn pli-malpli esperantoparolantajn konatulojn el *Phoenix* por renkontiĝi proksime de universitato en librejo, en gasteja angulo. Kunvenis dek personoj. Unue ĉiu prezentis sin. Poste ni parolis pri diversaj temoj, inter aliaj pri ebleco estonte regule renkontiĝi en pli konvena loko por instrui, ekzerci kaj ankaŭ por babili. Ne estas facile fondi Esperantoklubon en Usono aŭ trovi homojn, kiuj pretas lerni Esperanton. La plej multaj Usonanoj opinias, ke ekzemple ĉie en Eŭropo ĉiu scias paroli la anglan.

Nun ni povas fini tion ĉi prelegon per la konata frazo: „La angla lingvo estas kiel luksa aŭtomobilo, kiu povas veturi nur sur bonaj stratoj, sed Esperanto estas kiel montbiciklo, kiu povas veturi ĉien.

Elena. Terjung

Seniorentreffen am 28./29. April 2010 in Leipzig

Ein kleines, schon etwas vom Laufe des Lebens gezeichnetes Häuflein „Esperantosprecher" der Kulturgruppe Esperanto in der Stiftung Bahn-Sozialwerk, versammelte sich nachmittags vor der Stadtinformation in Leipzig zum geführten Spaziergang durch den Kern der Stadt.

Es war die beste Möglichkeit, die bekannten Sehenswürdigkeiten der Leipziger Innenstadt in kurzer Zeit kennen zu lernen. (Leider wird vieles wieder vergessen.) Vorbei an Oper, Gewandhaus und Universität gelangten wir zu einer der wohl bekanntesten Kirchen in Deutschland, zur „Nikolaikirche", die im Mittelpunkt der Ereignisse im Herbst 1989 stand. Der Weg führte uns vorbei an historischen und modernen Gebäuden, zu dem von zwei Figurengruppen aus Goethes Drama „Faust" flankierten Abstieg in „Auerbachs Keller". Hier haben wir am nächsten Tag zu Mittag gegessen, an der Stelle, wo vor etwa 500 Jahren stockbetrunkene Studenten von Faust und Mephisto besucht wurden und ihren Schabernack mit ihnen trieben. Uns blieb der Besuch des Teufels erspart, denn Esperantosprecher, zumal ehemalige Eisenbahner, waren und sind immer brave Leute gewesen. Aber ein klein wenig der Faustischen Philosophie steckt doch noch in uns Senioren: Wir fragen, (warum Esperanto?) wo führt die Vielsprachigkeit in der Welt uns hin? und werden nicht müde auf den Wert des Esperanto hinzuweisen. Wo findet man sonst noch die Solidarität, wie sie (die) es im BSW (noch) gibt? Als Überraschung wurden einige Exemplare der Szene „Auerbachs Keller" (Esperanto: „Aŭerbaĥa kelo") aus Goethes Faust in der Esperanto-Übersetzung verteilt.

Als letzter Teil des Spaziergangs betraten wir ehrfurchtsvoll die Thomaskirche, wo Bach wirkte, Luther predigte, der Thomanerchor entstand und Bach bestattet wurde. Leipzig kann sich mit Stolz Musikhauptstadt nennen, wenn man die Namen der Komponisten nennt, die hier geboren wurden oder hier wirkten: Johann Sebastian Bach und seine Söhne, Felix Mendelssohn-Bartholdy, Edvard Grieg, Richard Wagner, das Paar Robert Schumann und Clara Wieck.

Der Spaziergang endete ganz profan und müde im „Thüringer Hof", in der ältesten Gaststätte Leipzigs. Welche Ehre für uns hier zu speisen. Hier speisten Bach und Luther, (das Luthergericht steht noch heute auf dem Speiseplan: Gepökeltes, gekochtes Eisbein mit Sauerkraut und Thüringer Klöße. Lecker!). Geistliche und weltliche Würdenträger kehrten hier ein, Freunde und Feinde Luthers, Bischöfe, Kanzler und Esperantosprecher der Stiftung Bahn-Sozialwerk. Der Thüringer Hof war Zeuge von Martin Luthers Disputation mit Dr. Eck in der benachbarten Pleißenburg. (Besteht heute nicht mehr.)

Am folgenden Tag fuhren wir im original englischen Doppelstockbus auf Entdeckungsreise quer durch Leipzig. Wir erfuhren sehr viel über die bedeutende Handels-, Kultur- und Universitätsstadt (Altes und Neues): Vorbei am Hauptbahnhof, der jetzt eigentlich „Hauptbahnhof-Galerien" heißt, wie die Inschrift über dem Eingang zeigt. Weiter vorbei am Schillerhaus, wo Friedrich von Schiller für seine Freimaurerloge

die Ode an die Freude schrieb, die später in Beethovens 9. Sinfonie Eingang fand. Das weltbekannte Völkerschlachtdenkmal durfte nicht fehlen, wo schon 1813 ein kleiner Weltkrieg mit 120 000 Gefallenen stattfand, (ein Massenkrieg) und die Europaunion mit vielen Ausnahmen geprobt wurden.
Zuletzt kehrten wir in Auerbachs Keller ein (siehe oben). Und hier endete unser Esperanto-„Altentreffen" in Harmonie und mit vielen neuen Eindrücken, Dank der Stiftung Bahn-Sozialwerk. Rolf Terjung



Foto: Wikipedia

****



Fritz Lautenbach
85

La redaktoro de nia "FE" jam ekde 9 jaroj redaktas kaj prizorgas la eldonon de nia GEFA-informilo.Li faris kaj faras tiun-ĉi temporaban kaj laborriĉan redaktadon ĉiam tre zorgeme, lerte kaj kun granda akurateco!
Nun, en la kuranta jaro li vere 85-jariĝis, precize la 5-an de marto. Li lernis Esperanton en 1952, estas ekzamena komisaro ekde 1972, kunkompilis kaj gvidas niajn du telekursojn ekde 1982 kaj redaktas – kiel dirite – ekde 2001.
La germanaj Esperantistoj-fervojistoj kaj precipe la GEFA-estraro deziras al la jubileulo fortan sanon, ĝojplenan vivon sur ĉiuj flankoj de la vivo kaj memkompreneble ĉiam kiel ĝis nun bonegajn ideojn kaj diligentajn kunlaborantojn en la redaktora agado kaj laboro!!
En la nomo de GEFA Achim Meinel/prezidanto

****



Wir gratulieren herzlich
unserem langjährigen, treuen Mitglied
Wenzel Weber
aus Lünen
zu seinem 90. Geburtstag,
den er am 15. April gefeiert hat

Wir trauern um

Egon Roderer

* 10.8.1922 † 9.5.2009

Jahrzehntelang war er unser treues Mitglied und ein Streiter für unsere Idee

Wir trauern um unser langjähriges treues Mitglied

Gerhard Häntzschel

aus Glücksstadt

*27.4.1916 † 21.9.2009



Ni perdis karan amikon kaj fidelan membron

Heinz Papenfuß

Preskaŭ 84 jaraĝa li mortis la 24an de Aprilo 2010
Ni ĉiuj tre ŝatis lin.
Ni vidis lin en preskaŭ ĉiuj kunvenoj kaj kongresoj.
Li estis ĉiam helpopreta kaj aktiva amiko.
Kara Heinz, ni ne forgesos vin

Ripozu en Paco Hg

Kalendaro

19.06.2010
REVELO-Tag in Sundern-Stockum
Petra.dueckershoff@esperanto.de

17.-24.07.2010
95a Universala Kongreso en Havano
wolfgang.schwanzer@esperanto.de

17.-23.07.2010
Internacia Esperanto-Konferenco
en Herzberg (Harz)
(05521) 5983 www.ic-herzberg.de

06.-13.08.2010
Internacia Kongreso en Strasburgo
www.esperantoland.org/
internacia_kongreso/

Wenn Sie uns eine Spende zukommen lassen wollen, hier unser Konto:
Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
Konto 953 729 bei der Sparda-Bank Hessen, BLZ 500 905 00

Redaktfino por FE 3/2010 estos la 15.08.2010
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de